
# Programo de KKPS

| | VENDREDO | SABATO | DIMANĈO |
|---|---|---|---|
| 8.30-10 | | Matenmanĝo | Matenmanĝo |
| 10-11 | | Kurseto de eo (Magnus)<br>*vidu paĝon 1* | Kurseto de eo (Magnus)<br>*vidu paĝon 1* |
| 11-12 | | Biciklado (Nico)<br>*vidu paĝon 1* | Prelego pri socia rolo de klaĉoj (Manuela) (ekde 10.30)<br>*vidu paĝon 3* |
| 12-13 | | Biciklado (Nico) - Itala kuirarto (Manuela)<br>*vidu paĝon 3* | Prezento pri malrubigado (Anjo) |
| 13-14 | | Biciklado (Nico) | Tagmanĝo |
| 14-15 | Ekskurso en Roterdamo (Nico) | Tagmanĝo | Purigado |
| 15-16 | | Dezegnado (Céline) | Purigado |
| 16-17 | | Prelego pri NePerforta Komunikado (Gijom) (ĝis 17.30)<br>*vidu paĝon 3* | |
| 17-18 | Registriĝo (Nico- Roĉjo - Alekĉjo) | | |
| 18-19 | Filmo pri PSKK2006 (LukiZ)<br>Prezento (Roĉjo kaj Alekĉjo)<br>*vidu paĝon 2* | Cerbumado pri FESTO2013 (Alekĉjo)<br>*vidu paĝon 2* | |
| 19-20 | Vespermanĝo | Vespermanĝo | |
| 20-21 | libera tempo - purigado | libera tempo - purigado | |
| 21-22 | Solena malfermo kaj Klaĉa Vespero - Ludoj, Fotokonkurso<br>*vidu paĝon 2* | Koncerto de Gijom<br>*vidu paĝon 3* | |
| 23 | Nokta Programo: Homlupa Ludo | Nokta Programo: “Nigraj Rakontoj” (Seb)<br>*vidu paĝon 3* | |



# Pos-Amiko

Aŭtuno 2012, Numero 2

**INDEKSO:**


- La mistero de eternaj komencantoj: solvita!.1
- Nederlanda kafo la plej bona en la mondo......1
- Esperantistoj prirabas bankon.........………2
- FESTO konkeras TEJO-n.....……….....…2
- PRS vagas tra Esperantujo.....……...2
- Malveraĵo en PosAmiko: Poso pardonpetas.…………...3
- Platano reaperis........3
- Michael Boris anoncas dieti............................3
- Zamenhof revekita per elektroscienco...........3
- Horoskopo.................3
- EVENTOJ………….. 4


## La mistero de eternaj komencantoj: solvita!

Esperanto, la plej facila lingvo de la mondo, estas parolataj de milionoj da homoj, sed granda parto el ili mempritaksas sian lingvonivelon 'malalta' aŭ 'komencanta'. Tio ŝajnas paradokso. Ekzemple mi mem, Koko Poso, bezonis nur tri tagojn por atingi fluecon en la lingvo, kaj mia kuzo Foko Poso nur tri jarojn. Dum la somero kelkaj ĵurnalistoj de la Pos-Amiko iris al kelkaj Esperanto-renkontiĝoj, sin ŝajnigante komencantoj, por esplori la misteron de eternaj komencantoj. Kaj la konkludo estas klara kaj senduba:

La kaŭzo de la ekzisto de eternaj komencantoj estas tro bonaj kursoj por komencantoj. Ĉar la malaltnivelaj kursoj kutime havas pli multajn ludojn, pli entuziasmajn kaj ĉefe pli junajn instruistojn, lernantoj hezitas aŭ rifuzas progresi al sekva nivelo. Unu esperantistino ekde dek jaroj anonime deklaris: "Mi en plu ke kvar jaroj amas la juna kaj bela instruisto [eraroj enlasitaj, red.] de la unua nivelo, mi ne volas al alia kurso!" PosAmiko konsilas al organizantoj de Esperanto-renkontiĝoj estonte nur meti malbelajn, maljunajn kaj enuajn instruistojn en la komencantajn kursojn.

*Sabato 10:00 kaj dimanĉo 10:00*

## Nederlanda kafo la plej bona en la mondo

Dum oktobro juĝistoj de la PosAmiko vizitis kafejojn en multaj landoj por decidi, kie niaj legantoj povos trovi la plej bonan tason da kafo. En tricent dudek sep kafejoj en ses mondopartoj oni mendis unu tason da kafo sen lakto, unu tason kun lakto, kaj unu pecon da kuko. Bonaj kafoj estis trovitaj en multaj landoj, sed Nederlando klare elstaris: "Oni sentas sin tiom malŝtrecitaj en nederlandaj kafejoj, kiaj ekzemple Koffieshop de Boeddha en Delfto. Kaj la servistaj flugdrakoj estas ankaŭ unika sperto." Indas tamen rimarki, ke el ĉiuj landoj la kuko estas plej multekosta en Nederlando. "Mi instigas al ĉiuj fari kiel mi biciklan viziton al la kafejoj de Nederlando kaj al la arboj. Belaj arboj. Nekredeblaj arboj."

*Sabato 11:00*

## Esperantistoj prirabas bankon

La nederlanda socio ĉi-merkrede estis ŝokita de granda senhonta rabo ĉe unu el la plej grandaj bankoj de la lando. La roterdaman filion de Rabobank nv posttagmeze eniris du maskitaj uloj. Ĉar je tiu tago estis halovino, neniu laboristo konsideris stranga tion. Dirante, ke ili venas por purigi la monerojn, la du rabistoj ricevis aliron al la kasoj kaj dek kvin minutojn poste eliris kun preskaŭ dekmil moneroj. Laŭ la ĉefo de la polico la rabistoj verŝajne kaŝas sin en la ĉirkaŭaĵoj. Se vi vidis ion aŭ havas utilajn informojn, bonvolu telefoni al 0031-10-1889726.



*Vendredo 18:30*

## FESTO konkeras TEJO-n

En la somera eldono de la PosAmiko mi malkovris la ampleksajn planojn de Łukasz Żebrowski por sole regi TEJO-n, sed nun evidentiĝas, ke alia grupo ekde longa tempo provas kaŝe gajni influon. La organiza teamo de FESTO, anarĥiisma festivalo en Francujo, jam dum jaroj havas siajn spionojn en Roterdamo. Tio komenciĝis en 2009, kiam la franco Alexandre Baudry iĝis volontulo de TEJO. Post Alexandre sekvis Manuela Ronco, oficiala telerlavisto de FESTO, kiu en TEJO por si kreis influriĉan postenon de oficisto. Poste estis la FEST-ano Sebastien Denux, kaj la nuna volontulo estas la kasisto mem de FESTO: Quentin Weber-Seban (kiu cetere membras en la tutmonda juda konspiro). Krome laŭ nekonfirmitaj klaĉoj la FESTO-teamo ankaŭ sendas spionon al Brazilo por eniri la organizan teamon de IJK 2014. Vidu dum tiu ĉi KKPS la batalon inter la du flankoj!

*Sabato 17:30*

## PRS vagas tra Esperantujo

Je la fino de la somero alvenis raportoj pri epidemio, kiu ekvagas tra Esperantujo. Konata laŭ la mallongigo PRS, simptomoj de la malsano estas laceco, malĝojo, strangaj sonĝoj kaj malemo reveni al ĉiutaga vivo. Ĝis presado de tiu ĉi PosAmiko ne estas mortintoj pro PRS, sed la ekonomia damaĝo certe jam grandas milionojn da steloj. D-ro S. Piro, sciencisto ĉe la Akademia Internacia de la Sciencoj en San Marino, raportas pri la fenomeno: "La malsano klare disvastiĝas per Esperanto-renkontiĝoj. Ĉiam du aŭ tri tagojn post la renkontiĝo la statistikoj montras multajn novajn okazojn de PRS. Eble insektoj transdonas la infekton, ekzemple denas-kuloj." Ĝis nun la nura kuracilo kiu efikas kontraŭ la malsano evidentiĝis esti aliĝado al estontaj renkontiĝoj.

*Vendredo 21:00*

## ANONCO

Volontuloj bezonataj por scienca eksperimento pri ebla ligo inter biero kaj ebrieco. Respondu al d-ro B. Telo.

*Vendredo 23:00 kaj sabato 23:00*

## Malveraĵo en PosAmiko: Poso pardonpetas

Kvankam mi ĉiam klopodas doni al vi la veron kaj nenion pli krom la vero, atentaj legantoj informis min, ke en la pasinta eldono de tiu ĉi mondfama gazeto aperis iu aserto prezentita kiel fakto, kiu fakte ne estis vero! Kredu min, tio estis la plej malĝojiga momento en mia longa ĵurnalista kariero. Nun legantoj, certe tiuj, por kiuj la somera PosAmiko estis la unua renkontiĝo kun tiu ĉi fenomeno, povus facile pensi, ke temas pri malserioza klaĉgazeto (por tiuj, kiuj interesiĝas pri klaĉoj, iru al la altnivela prelego de Manuela je dimanĉo). Sed ne estas tiel. Per tiu ĉi komuniko mi volas esprimi mian bedaŭron al la koncernaj homoj, kies reputacion mi espereble ne tro damaĝis. Do jen la korekto: Tokipono havas 118 vortojn, ne 123, kiel mi skribis en la artikolo pri Blarek Mahuš. Pardonu min.

*Dimanĉo 11:00*

## Platano reaperis

Post foresto de pli ol cent tagoj la fama poeto Platano estas retrovita. Li troviĝis en kelo de Gijom, kiu estas prenita al fortikaĵo norde de Roterdamo por demandado. Gijom konfesis al Poso: "Mi enviis liajn buklojn. Ekde kiam miaj haroj ekmalaperis, la honto kreskis kaj kreskadis. Mi komencis porti bluan ĉapelon por kovri la senharan parton de mia kapo, sed baldaŭ ankaŭ tio ne sufiĉos." Ankoraŭ ne certas, ĉu kun la reveno de Platano ankaŭ la elsendoj de Pariza Ventro rekomenciĝos.

*Sabato 16:00 kaj 21:00*

## Michael Boris anoncas dieti

"Krom dum la manĝoj."

*Sabato 12:00*

## Zamenhof revekita per elektroscienco

La fama rusa okulisto Ludoviko Zamenhof pasintmonate releviĝis el sia tombo pro sukcesa eksperimento de la elektrosciencistoj Igor kaj Isak Dioto. Ili planis eldoni artikolon en la Scienca Revuo pri la sukceso, sed malfeliĉe ambaŭ malaperis nelonge poste. La revekito, kiu sin nomas Lazaro Zombenhof, faris la jenan deklaron: "Cerbojn! Pliajn cerbojn!". UEA jam kontaktis lin por iĝi la nova redaktisto de la revuo Esperanto.

*Sabato 23:00*

## La horoskopo

**Ŝafo:** Vi renkontos interesan fremdulon. Li kontrolos vian bileton.

**Taŭro:** Vi estas homlupo.

**Ĝemeloj:** Novembro estos bona monato por amikeco, sed eĉ pli por klaĉoj.

**Kankro:** Vi trovos en via tirkesto mil sescent tri neuzitajn matenmanĝkuponojn.

**Leono:** Vi iros al la plaĝo por sunbruniĝi kaj preskaŭ frostmortos.

**Virgulino:** Post la klaĉaj ludoj vi ne plu estos.

**Pesilo:** Via religio malpermesas horoskopojn kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi falos per biciklo. Ne timu, kantu.

**Aleks Kadar:** Vi ekloĝos en la Eifelturo por havi freŝan aeron.

**Sagitario:** Vi ekhavos novan amikon, kiu malbele kantas ebrie.

**Kaprikorno:** Atentu dum novembro pri neatenditaj akuzativojn!

**Akvisto:** Dimanĉo estas bela tago por vekiĝi je la sesa (se vi havas infanojn).

**Fiŝoj:** Vi volas iĝi SAT-ano, sed bedaŭre vi ne parolas la francan.